# *Díaz-Canel akceptas akredita?ojn de novaj ambasadoroj en Kubo*



**Foto: PL**

Havano, jun 11 (RHK) La prezidento, Miguel Díaz-Canel, akceptiis hodia? la akredita?ojn de sep novaj ambasadoroj  en Kubo, kaj dankis ilin pro la subteno de iliaj nacioj por forigi la blokadon de la usona registaro de la insulo.

La? raporto de kuba televido, la ?tatestro proponis la tutan helpon de la Antila Registaro por plenumi siajn funkciojn al la diplomatiaj reprezentantoj de Vjetnamio, Salvadoro, Timor-Leste, Barbado, Hispanio, San-Marino kaj Nikaragvo.

En la Palaco de la Revolucio, sidejo de la ekzekutivo, Díaz-Canel akompanata de la provizora ministro pri eksteraj aferoj, Gerardo Peñalver, elstarigis aspektojn de la duflankaj rilatoj de Kubo kun ?iu el la nacioj, kiuj hodia? akreditis siajn legaciojn.

Anta? la vjetnama diplomato, Le Quang, la Prezidanto de la Respubliko rekonis la  fratecajn ligojn inter amba? nacioj, hereda?o de iliaj historiaj gvidantoj Fidel Castro, Raúl Castro kaj Ho Chi Minh.

La? la raporto, la kuba ?tatestro afable dialogis kun ?iuj novaj ambasadoroj en Kubo kaj elstarigis aspektojn de la reciprokaj rilatoj de Kubo kun ?iu el la reprezentataj landoj.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/357123-diaz-canel-akceptas-akreditajojn-de-novaj-ambasadoroj-en-kubo

**Radio Habana Cuba**